



PENSEO

N-ro 181

nov./2006

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Ploru ne plu

Al Lucia Marder*

Ploru ne plu,
Karesema kara,
La birdeto forflugis
Al densej' arbara.

“Jen ne zorgu pri mi,
Kiu vivas nun libera,
Ĉiuj anoj amas min,
Ĉiu estas ja sincera..”

Ploru ne plu,
Karesema kara.
Jen la sun' ridete brilas,
La ĉiel' vastiĝas klara.

Bonkoro (Gu Cunhua)

2-11-2006 en Chongqing

**Tio estas vera historieto. Antaŭ nelonge, Karesema, juna esperantistino de Brazilo perdis sian dek-jaran karan filineton. Ofte ŝi songis pri sia filineto kaj vokadis al ŝi hejmenreveni. La historieto emociis Gu Cunhua, ĉina esperantisto, kiu verkis ĉi tiun poemeton por konsoli kaj kuraĝigi ŝin, tiel ke ŝi povas pluvivi firmvole. Karesema titolis la poemverkinton Bonkoro.*

— Mao Xiaoli



La Belaj Manoj

Antaŭ ol konatiĝi kun li, ŝi ne trovis sin eksterordinara.

Post konatiĝo kun li, li diris, ke ŝi havas paron da plej belaj manoj en la mondo.

La tagoj de ilia kunvivo estis ordinaraj. Tamen en liaj okuloj, ĉiu tago estis nova kaj freŝa. Kun plena memfido, li ĉiam pretis doni al ŝi la plej bonan vivon. Karesante ŝiajn manojn, li ofte diris, "Certe multaj knabinoj envias vin, ĉar vi havas tiom belajn manojn." Tiuj vortoj mirigis ŝin, ĉar ŝi neniam aŭdis pri tiu laŭdo nek sentis fieron pri tiel nomata beleco. Iel ŝajnis al ŝi, ke ŝiaj manoj fariĝas pli kaj pli belaj.

"Ĉu ili vere estas belaj?" ŝi ofte demandis al li.

"Jes, vere belaj. Do, por protekti viajn belajn manojn, ne faru tro multajn hejmaferojn."

Ŝi faris rideton. Tio ŝajnis vera, ĉar la viro restigis preskaŭ neniom da mastrumado al ŝi, sentigis ŝin pli faciligita, kaj montris al ŝi elkoran amzorgon. Ĉiufoje, kiam ŝi lavis vestojn, li alproksimigxis ame riproĉetis: "Tiom malvarma akvo! Ĉu eblus lavi?" Post tio, viŝinte la akvon de ŝiaj manoj, li mem volonte trempis siajn manojn en la fridan kuvon. En liaj okuloj, ĉio ĉe ŝi estas la plej bona, kaj ĉio farita de ŝi ankaŭ estas aminda. Ŝi jam delonge ne rigardis sin en spegulo, ĉar liaj vortoj ja povis servi kiel ŝia spegulo: "Vere bele vi aspektas en tia vesto!", "Vere belaj viaj okuloj!", "Via haŭto blankas pli!"

Tamen ŝi sentis obtuzan malkontenton interne. Ju pli ofte ŝi vidis lian admiran rigardon, des pli ŝi sentis sin bela kiel cigano. Ŝi devis vivi pli bonan vivon kaj edziniĝi al pli bona viro. Ŝi proponis rompi ilian rilaton kelkfoje, sed pro tio, li suferis ĝismortan kordoloron kaj li neniel sciis la kialon, ĉar li amis ŝin tutkore. Lastfoje, li ne plu retenis ŝin, dirante, ke se ŝi ne sentas sin ĝoja kunvivante kun li, li volontos apartiĝi kun ŝi. Ankaŭ en ŝia koro naĝis iom da bedaŭro, sed kiam ŝi prikalkulis sian principinan vivon kaj la estontan princon, ŝi krule deiris de li.

Post ilia disiĝo, ŝi vere renkontis la viron, al kiu ŝi tre deziris edziniĝi. Kun granda kontento, ŝi baldaŭ edziniĝis. Post geedziĝo leviĝis pulvofumo de konfliktoj inter ili, kaj la ofteco de kverelado ĵetis ŝin en terurigon. Ŝi neniam trovis en la rigardo de sia edzo tian brilon, kia tiun de *li*. Kun frustiĝo, ŝi montris sin senpova pri la elektado de sia edzo. Poste, kvelerado maloftiĝis. La juna edzo komencis turni sian dorson al kaj eĉ ignori ŝin. En la malplena ĉambro, ŝi rigarde ekzamenis siajn manojn foj-refoje, per kiuj ŝi mastrumis, servis al la edzo, kaj pene laboregis, kaj tio nature kondukis ŝian penson al *li*.

Nokte ŝi ne sukcesis endormiĝi. Ŝi malpeze puŝe vekis sian edzon el profunda dormo kaj demandis al li, "Ĉu miaj manoj estas belaj?"

"Mi ne rimarkis," li grumblis.

"Nun pririgardu ilin, ĉu bone? Iu diris, ke mi havas la plej belajn manojn en la mondo."

Scivolemo fine turnis lin sur alian flankon por ĵeti ekrigardon al ŝiaj manoj. "Hm, ĉu viaj? La plej belaj? Mi diru la veron al vi, ke ili estas tre ordinaraĵoj. Kial vi tiel atentemas pri viaj manoj? Kiu priatentas ilin?" Li turniĝis kaj denove falis en pezan dormon, lasante ŝin en la malluma nokto pensadi, kiu el la edzo kaj *li* diris la veron.

En kunveno de la kompanio, ŝi kaj

kelkaj koleginoj el la sama sekcio sidis kune kiel kutime, kaj ŝi prenis sidlokon en la fronta seĝo. Ŝi tute ne aŭskultis kion la ĉefo de la kompanio preparolis, ĉar ŝi direktis sian tutan atenton al la longa arkforma tablo por kunveno, sur kiu metiĝis pluraj virinaj manoj kun skribiloj. Tiuj manoj ĉiuj karakteriziĝis per apartaj trajtoj de blankkolumaj profesiulinoj. Ankaŭ ŝi metis la siajn sur la tablon por sekrete fari zorgemajn komparojn kun iliaj. Ŝi trovis, ke ŝiaj fingroj neniam superas iliajn en longeco, malhele bruneta, kun iom nodiĝintaj artikloj kaj sen haŭta delikateco kiel tiu de klerigitaj inoj.

Tiumomente ŝi faris suspiron. Eble, ŝia edzo diris la veron: ŝiaj manoj estas tre ordinaraĵoj.

La mesaĝilo-kodo de *li* ankoraŭ vivis surrete, al kiu ŝi ne konektis por longa tempo. Ŝi leĝere tajpis unu linion pere de reta mesaĝilo: Dankon pro via iama amo al mi. Por teni min for de mastrumado, vi diris, ke mi havas paron da belaj manoj.

Baldaŭ ŝi ricevis la respondon de *li*, "Ne tute. En la mondo, vi estas nur unu homino. Tamen por mi, vi estas mia tuta mondo. Viaj manoj kompreneble estas la plej belaj en miaj okuloj."

De tiam, la kapbildo de *li* neniam aktiviĝis sur la ekrano de komputilo.



Elĉinigiĝis **Helo**

Ĉinesko

Zhuang Qixiong (1962 —)

Virto

— laŭ ĉinesko Langtaosha

Li kantetas por
gaja humor'.
Edzin' feliĉas de flor'.
Sento senlima kuŝas
en lia kor'.

Ne lasu lin for
pro freŝa flor'!
Ĉu vi kredas, virt' sen or'
pli bona ol senhonor'?'
Plej granda hor'!



Vin Salutu

— laŭ ĉinesko Yishaonian
Ĉiutage
ni vivas en
simpla domo,
sed amon havos
honesto homo.

Salutu Vin en nomo
de Mi!Kun
roz-aromo,
al frukt-dona kaj
verda fantomo!



Umefloro

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling

I.

Frosta, frosta,
umeflor',fer-osta!Al mi bon-odora;
al vi tre honora.
Rano,rano,
per puta ĉikano?

II.

Blanka,blanka,
umeflor',senmanka?
Ĝi disfloras sole
kaj odoras vole.
Levo, levo,
kun printempa devo!



Patro antaŭ Tombo Weining

— laŭ ĉinesko Changxiangsi

Ama kor',
larma kor',
al filino pro dolor'.
Kun sopira flor'!

Ora hor',
plora hor',
nur kiel ĉiela glor'.
Ĉu Dia favor'?



